

Od:

Datum: 1.2.2004 11:21

Předmět: Fw: Komitato por la eksperimentado de internacia
lingvo en EU

Fw: Komitato por la eksperimentado de internacia lingvo en EU:

----- Original Message -----

From: "Michele Gazzola" <michele78@virgilio.it>

DE: komitato@internacialingvo.org

Estimata S-rino, S-ro,

Mi estas Michele Gazzola, prezidanto de la Komitato por la eksperimentado de la internacia lingvo ene de Europ-Unio (KEILEU). Eble vi legis pri la KEILEU kaj sia starigo dum la kunveno de la transnacia radikala partio en Bruselo (7/8an decembro 2003).

Dum la kunveno en Bruselo, S-ro Giorgio Pagano, sekretario de ERA, prelegis pri la agado de ERA kun la Itala Ministerio pri Klerigado kaj pri ghiaj freshdataj rezultoj. La Ministrino, S-ino L. Moratti, sin engaghighis subteni ERA projekton pri eksperimentado de la internacia lingvo en Europ-Uniaj lernejoj. Pro tio, la Ministrino komunikis la adresojn de la anoj de la Europ-Unia komisiono pri klerigado, kiu kunordigas la komunajn instruadpolitikojn de EU-membroj. La unua pasho de la KEILEU estas zorgi pri la kontaktoj kun tiuj funkciuloj por ke ili poste permesu la eksperimentadon en siaj landoj. Kiam tio okazos, en la lernejoj kie la eksperimentado estos farita, lokaj esperantistoj organizos ghin kune al la lernejestraroj.

Pro efike labori, KEILEU bezonas havi reprezentanton en chiu la 25 EU-membra statoj. Tiu homo estus la reprezentanto de KEILEU en la lando, kaj ne la reprezentanto de la lando en la Komitato. Al la Komitato mankas ghis nun la reprezentantojn por la jenajn landojn: Aŭstrio, Ĉeĥio, Cipro, Finnlando, Grekio, Hispanio, Irlando, Letonio, Litovio, Luksemburgio, Malto, Slovakio, Slovenio, Svedio.

Pro tio mi skribas al vi, por scii ĉu vi povus helpi nin trovi reprezentanton en via lando aŭ esti vi mem la reprezentanto.

Ideale, la reprezentanto devus havi la jenajn karakterizajhojn:

A. Kompetenteco. Oni devas labori kun la naciaj ministerioj pri publika klerigado. Do, ekzemple, tre taŭxgas fakuloj pri pedagogio aŭ interlingvistiko aŭ sistemoj de instruado, ktp.;

B. Proksimeco al la sidejoj de la Ministerio;

C. Bone koni esperanton.

Kompreneble vi konas pli bone ol mi vian medion kaj do tiuj chi karakterizajhoj estas nur la proponoj por sin orientigi. La reprezentanto, laŭ lia/shia neceso, povas trovi laborhelpantojn por ebligi la plej efikan kaj rapidan agadon (ekzemple: sekretario, tradukisto, ktp.).

Mi estas preta doni al vi pli da informoj, se bezonataj. Ĉiukaze mi invitas

vin che la forumo de la Komitato:

http://www.internacilingvo.org/public/ilo/modules.php?op=modload&name=Arena_Forum&file=index&action=viewforum&forum=5

Por havi pli da informoj kaj proponi reprezentanto skribu al:

komitato@internacilingvo.org

Atendante vian reagon, mi kore salutas vin

Michele Gazzola